

CARTO DE VOLONTULOJ

EUROPA CARTO PRI RAJTOJ KAJ RESPONDECOJ
DE VOLONTULOJ



european
youth forum

Editorial team

Editor in Chief — Giuseppe Porcaro

Copy Editor — Thomas Spragg

Graphic Design — Laurent Doucet

European Youth Forum

120, rue Joseph II

1000, Bruxelles

Belgium – Belgique

with the support of :

the European Commission

the European Youth Foundation of the Council of Europe



Youth
in Action
Programme



ISSN : 2032-9938



2012 European Youth Forum

ENKONDUKO

Sekcio I – Difino

- 1. Difino de volontulo**
- 2. Difino de volontuladaj perantoj**
- 3. Difino de volontuladaj aktivaĵoj**

Sekcio II

- 1. Volontulaj rajtoj**
- 2. Respondecoj de la volontulo**

Sekcio III

- 1. Rajtoj de volontuladaj perantoj**
- 2. Respondecoj de volontuladaj perantoj**

Sekcio IV – Posta aktivaĵo

ENKONDUKO

Ni, subtenantoj de la Ĉarto, kredas ke la aliro al volontulado kaj aktivaj civitanecaj oportunoj estas rajto, ne privilegio. Ni estas profunde konvinkitaj ke ŝiu persono rajtas volontuli ie ajn en la mondo. Por instigi kulturon de partoprenado, persona kaj respondeca evoluo, same kiel aktivan civitanecon en Eŭropo kaj en la mondo, volontuloj bezonas aliron kaj instigon engaĝiĝi en volontulaj aktivecoj. Tamen, unue kaj precipe – volontuloj bezonas firmigon tra la rajtoj kiuj kongruas kun iliaj bezonoj kaj iliaj devoj. Volontulado bezonas firmigan kaj ebligan medio. Ni certas ke la tuta kaj efektiva realigo de la rajtoj kaj respondecoj en tiu ĉi Ĉarto plibonigos la kondiĉojn por volontulado kaj volontuloj.

Rajtbazita koncepto rilate al volontulado kaj la normoj, principoj kaj celoj de volontulado, agnoskas la specifan kuntekston kaj malsamajn formojn de volontulado kiel startpunkto. Ĝi fondas volontulojn kiel aktivajn rajtulojn kaj kreas korespondantajn devojn por respondecoj. Plie, rajtbazita koncepto celas firmigon kaj ebligon de la

rajtanoj por efektiviĝi iliajn rajtojn. La fundamento por la rajtbazita koncepto pri volontulado en Eŭropo ekzistas, kiel aperas en ĉefaj Unuiĝintaj Naciaj, Eŭropakonsilaj kaj Eŭropuniaj dokumentoj kaj iloj rilataj.

Same, la EYV2011 Alliance, ĉirkaŭ 40 Eŭropaj organizaroj aktivaj en volontulado, skribis ke “kvankam estas granda aro da konceptoj, difinoj kaj tradicioj rilate al volontulado (...), Ĝi estas ĉefesprimado de aktiva civitaneco kaj meritas – komplemente al politika partoprenado – pli bona agnoskon, promocion kaj plifaciligon”¹.

Pli ol 100 miljonoj da homoj en Eŭropo estas volontuloj², 3 el 10 Eŭropanoj asertas esti aktivaj en volontulado kaj proksimume 80% de la Eŭropaj civitanoj sentas ke volontulado estas grava ero de Eŭropa demokratio.³ Tial estas investado en volontulado ankaŭ investado en socia kohero.

Konsekvenca, la valoro de volontulado devas esti tute agnoskita kiel kreanta sencon de Eŭropa identeco kaj aktiva civitaneco,

Eŭropa Ĉarto pri rajtoj kaj respondecoj de volontuloj

1. www.eyv2011.eu
2. Special Eurobarometer 273
3. Eurobarometer, 2007

kontribuo al publika bono, homara kaj socia kapitalo. Plie, ĝi estas fonto de ekonomia kreskado, vojo al integrado kaj aktivaĵo, pozitiva rezulto kaj mekanismo por plibonigi koherecon. Volontulado ankaŭ reduktas ekonomiajn, sociajn kaj ekologiajn malegalecojn.

La Ĉarto plirangigas la rolon de partoprenistaj organizoj kiel ĉefaj perantoj de volontulado, kio signifas ke volontuloj devas kunesti en la decidaj procedoj de la organizo kaj estas tiel aktive parte al la organiza vivo. Samtempe, la Ĉarto agnoskas la diversecon de volontulaj aktivaĵoj, malsamajn tipojn de volontuladaj perantoj kaj volontuladon kiu okazas sen perantoj. La Ĉarto reflektas la bezonojn de ĉiuj volontuloj, t. e. la rajtoj de aktivaj civitanoj volontulantaj ekster la kadro de volontuladaj perantoj estas ankaŭ menciita.

La Eŭropa Ĉarto de la Rajtoj kaj Respondecoj de Volontuloj kreas komunan komprenon de la difino de volontuloj, volontuladaj aktivaĵoj kaj volontuladaj perantoj de la loka ĝis la Eŭropa nivelo kaj disponigas komunan bazan rajtaron por volontuloj kaj volontuladaj perantoj. Plie, la Ĉarto utilas kiel alvoko por projekti kaj ĝisdatigi politikaĵojn rilatajn al volontulado je ĉiuj niveloj, kun limigitaj proponoj por konkretaj efektivigaj meĥanismoj kaj sen identigi rajtrespondecojn, kun fokuso je difino kaj esprimo de la rajtoj kaj respondecoj de volontuloj.

SEKCIO I

DIFINO

1. Difino de volontulo

Volontulo estas homo kies aktivaĵoj liber-volaj beneficas al la socio. Tiuj aktivaĵoj okazas pro neprofita celo, favoras la personan evoladon de la volontulo, kiu utiligas tempon kaj energion por la ĝenerala bono sen financa rekompenco.

2. Difino de volontuladaj perantoj

Volontuladaj perantoj estas neprofitaj organizoj kaj grupoj, kiuj sendependas kaj memgovernas, same kiel neprofitaj estaĵoj, ekzemple publikaj instancoj. Ili aktivas en la publika zono kaj iliaj aktivaĵoj devas celi, almenaŭ parte, kontribui al la publika bono⁴.

3. Difino de volontuladaj aktivaĵoj

Volontuladajn aktivaĵojn faras volontuloj. La aktivaĵojn oni faras pro neprofita kaŭzo kaj ĝi ne anŝtataŭas pagitan laboron. La aktivaĵo povas okazi tra volontulada peranto aŭ je iniciato de la volontulo memstare.

Europa ĉarto pri rajtoj kaj respondecoj de volontuloj

4. COM(1997) 241 : KOMUNIKO EL LA KOMISIO PRI PROMOCIO DE LA ROLO DE VOLONTULAJ ORGANIZOJ KAJ FONDUMOJ EN EŬROPO;

SEKTION II

1. Volontulaj rajtoj

Ĉefaj rajtoj

Artikolo 1

Ĉiuj, kiuj realigas volontuladan aktivaĵon, rajtas havi la statuson “volontulo” se ili volas, kaj tiujn bazajn rajtojn garantitajn.

Artikolo 2

La homaraj rajtoj de la volontuloj estu garantitaj, dum ili realigas sian volontuladan aktivaĵon.

Artikolo 3

Ĉiu persono rajtas egale aliri al volontuladaj oportunaĵoj⁵ kaj protekto kontraŭ iu ajn diskriminacio kiel pro aĝo, genro, seksa identeco, raso, koloro, lingvo, invalideco, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia origino, asocio kun nacia minoritato, enhavo, naskiĝo aŭ alia statuso kaj ne estu diskriminaciita pro lia fono aŭ kredo.

Artikolo 4

Neniu estu leĝe detenita partopreni al volontula aktivaĵo, kiun li/ŝi elektas, kondiĉe ke la volontula aktivaĵo realiĝu akorde al Homaraj Rajtoj kaj kontribuu al publika bono.

Artikolo 5

Ĉiuj volontuloj estu informitaj pri iliaj rajtoj kaj respondecoj.

Artikolo 6

Ĉiu volontulo rajtas havi socian protektaĵon dum lia/ŝia volontula aktivaĵo, t. e. sanaan kaj personan asekurecon.

Artikolo 7

Ĉiu volontulo rajtas kombini volontuladan aktivaĵon kun lia/ŝia privata kaj labora vivo, kaj tiel havas rajton al fleksebleco dum la volontulada aktivaĵo. Ĉiu volontulo rajtas plie rifuzi taskon kiu kontraŭas lian/ŝian kredon kaj/aŭ konvinkojn.

5. Bv. vidi la artikolon 28

Artikolo 8

Ĉiu volontulo rajtas volontuli ekster lia/ŝia loĝ- aŭ naskiĝlando. Tiel, se necesas, sen-kostan vizon li/ŝi povu obteni tra malferma, alirebla kaj memklara proceduro kiu favoras volontulan moveblecon.

Rajto al subteno de volontulaj perantoj

Artikolo 9

Ĉiu volontulo havas rajton al repago de elspezoj okazantaj kadre de volontulado, respektante malsamaj repagaj niveloj kiel rezulto de la diverseco de volontuladaj aktivaĵoj. Tiuj repagoj ne estu iel ajn impostitaj.

Artikolo 10

Ĉiu volontulo estu traktita laŭ la ekzistantaj normoj, principoj kaj celoj de volontuladaj politikajoj.

Artikolo 11

Ĉiu volontulo rajtas havi koheran taskpriskribon permesante lin/ŝin realigi la volontuladan aktivaĵon klare komprenante la celojn kaj objektivajn. La taskpriskribo devus esti plejeble realigita kaj akceptita kune inter la volontulada peranto kaj la volontulo kaj, se necesas, devus esti ĝisdatigata dum la volontulada aktivaĵo. Plie, ĝi devus difini ke volontuloj kaj dungitaro havas kompletajn rolojn kaj ke volontuladaj perantoj devas certigi ke bone kunlaboras tiuj du laborantaroj.

Artikolo 12

Ĉiu volontulo havas rajton al subteno kaj retrokomento tra la volontulado. Tiu enhavas pretigadon de la aktivaĵo, personan gvidadon kaj helpadon dum realigo de la aktivaĵo, adekvatan takson kaj raporton sekvante la aktivaĵon kaj plenan subtenon dum la realigado de la necesaj postaj aktivaĵoj.

Artikolo 13

Ĉiu volontulo rajtas partopreni al la decida procezo pri la volontulada aktivaĵo je la plej adekvata nivelo. Plie, ĉiu volontulo devus havi aliron al la demokrataj decidaj procezoj de la organizo. Ĉiu volontulo devus havi ioman posedon de la projekto tra kundecido en la proceda realigo kaj rajton partopreni en la demokrataj procezoj rilate al la projekto.

Rajtoj al persona evolvido

Artikolo 14

Ĉiu havas rajton al la necesa edukada/trejnada subteno por realigi la volontuladan aktivaĵon je lia/ŝia plena potencialo kaj plej bona scio.

Artikolo 15

Ĉiu volontulo havas rajton al agnosko, far edukadaj kaj profesiaj strukturoj kaj institucioj, de la kontribuo, kapablecoj kaj kompetentoj akiritaj per la volontulado. Volontuloj devus rajti elabori novajn kapablecojn kaj kompetentojn kaj devus havi spacon por malkovri, eksperimenti kaj konstrui sian propran lernvojon.

Artikolo 16

Ĉiu volontulo havas rajton, se necesas flanke de la volontulada peranto, al flekseblaj laborhoroj kaj edukadaj aktivaĵoj por realigi volontulajn aktivaĵojn. Necesus la realigo de volontulaj aktivaĵoj iom da fleksebleco far la kontraktaj aŭ edukadaj devoj, la volontulo interkonsentu kun la kontrakta aŭ edukada peranto.

2. Respondecoj de la volontulo

Artikolo 17

Ĉiuj volontuloj respektas la leĝajn regulojn kaj la nediskriminacion dum ilia volontulado.

Artikolo 18

Ĉiu volontulo respondecas pri respekto de la integreco, misio, celoj kaj valoroj de la volontulada peranto.

Artikolo 19

Ĉiu volontulo respektas la sindevigojn kun la volontulada peranto pri la kvanto de tempo kaj laboro kiun ili kune interkonsentis por realigi la volontulan aktivaĵon kaj la necesan kvaliton.

Artikolo 20

Ĉiu volontulo devas partopreni la proponitajn trejnadajn taŭgajn por li/ŝi, kaj rilatajn al la necesaj kompetentoj por realigi la konsentitajn taskojn. La trejnado estu senkosta por la volontulo.

Artikolo 21

Ĉiu volontulo respektu la sekreco de (organizaj) informoj, ĉefe kadre de leĝaĵoj kaj koncerne personaj datoj de membroj, laborantularo kaj benefituloj de volontuladaj aktivaĵoj.

Artikolo 22

Ĉiu volontulo komprenas ke volontulado celas benefitojn por la komuna bono aŭ socio.

Article 23

Ĉiu volontulo kunlaboras kun aliaj volontuloj en la organizo, kie necesas kaj kontribuas al la organiza daŭrebleco tra komunikado kun aliaj kaj transdonaĵo je la fino de la engaĝiĝo.

SEKCIO III

1. Rajtoj de volontuladaj perantoj

Artikolo 24

Neprofitaj Organizo kaj grupoj, sendependaj, memregantaj, same kiel neprofitaj estaĵoj aŭ publikaj instancoj, rajtas havi statuson de volontulada peranto.

Artikolo 25

Volontuladaj perantoj havas rajton al stabila kaj daŭra ebliga subtenkadro, inkluzive adekvataj fondusaj strukturoj disponeblante atingeblean, daŭran kaj flekseblan financadon.

Artikolo 26

Volontuladaj perantoj rajtas partopreni la politikan decidaj procezoj je ĉiuj niveloj pri volontuladaj temoj, riprezantantaj la intereso kaj bezonoj de volontuloj. Konsidere la sperto de volontuladaj perantoj, kiel aktoroj plejproksimaj al volontuloj, ili estu konsultitaj pri aferoj rilate al politikaĵoj aŭ leĝoj pri la volontulada sektoro je ĉiu niveloj.

Artikolo 27

Volontuladaj perantoj ne estu impostitaj je ilia enspezo.

Artikolo 28

Volontuladaj perantoj selektu volontulojn laŭ ilia misio kaj konceptado, kaj la specifaj kompetencoj kaj profilo de volontuloj, se kelkaj volontuladaj aktivaĵoj ilin necesas.

2. Respondecoj de volontuladaj perantoj

Ĉefaj respondecoj

Artikolo 29

Volontuladaj perantoj engaĝiĝas por ellabori volontuladan politikajon respektante volontulaj rajtoj.

Artikolo 30

Volontuladaj perantoj konu la validan leĝan kadron pri volontulado kaj inspektu leĝajn aspektojn koncerne la realigon de la volontulada aktivaĵo.

Artikolo 31

Volontuladaj perantoj garantiu la minimumigon de riskoj kaj disponigu klaron gvidadon por la volontulo. En tiu konteksto, la peranto mem engaĝiĝas por pretigi la plejble sekura laborspacon por la volontulo kaj por disponigi kompletan informon pri la eblaj riskoj rilate al la volontulada aktivaĵo.

Artikolo 32

Volontuladaj perantoj ofertu egalan kaj memklaritan aliron al informado koncerne volontuladajn oportunojn kaj la rajtojn kaj respondecojn de la volontuloj.

Artikolo 33

Volontuladaj perantoj efektivigu inkluzivan kaj egalan dungadprocedon por volontuladaj aktivaĵoj. Ili identigu barilojn kaj ellaboru ilojn por superforti ilin, por ke ili inkludu malsamajn grupojn.

Artikolo 34

Volontuladaj perantoj starigu infrastrukturon por asekura provizo kovrante socia protektado, t.e. sana kaj persona asekureco, por la volontulo dum la volontulado.

Artikolo 35

Volontuladaj perantoj antaŭenpuŝu volontuladon kaj ĝia benefitojn por la socio kaj por la individuo.

Respondecoj, subteni volontulojn

Artikolo 36

Volontuladaj perantoj repagu elspezojn de la volontulo kadre de la volontulada aktivaĵo.

Artikolo 37

Volontuladaj perantoj klare priskribu la taskojn, kiujn la volontulo devus realigi. La taskpriskribo devus esti plejble realigita kaj akceptita kune inter la volontulada peranto kaj la volontulo kaj, se necesas, devus esti ĝisdatigata dum la volontulada aktivaĵo.

Artikolo 38

Volontuladaj perantoj mem engaĝiĝu por ellabori kaj efektivigi kvalitajn normojn certigante pretigadon kaj informadon, ebligante personan gvidadon, helpadon kaj kontrolo tra la tuta procedo, klarajn taksmeĥanismojn kaj kompletan subtenon dum la realigo de la necesaj postaj aktivaĵoj; ideale, la volontulada peranto devus celi havi sistemon de kvalitatgarantio.

Artikolo 39

Volontuladaj perantoj disponigu al volontuloj la necesajn ilojn kaj aliron al ekzistantaj kaj antaŭplanitaj rimedoj por permesi ilin realigi la planitajn aktivaĵojn.

Artikolo 40

Volontuladaj perantoj certigu efektivan transprenadon kaj raportajn strukturojn por volontuloj por garantii la daŭripovon de la volontulado.

Artikolo 41

Volontuladaj perantoj certigu la rajton, partopreni la decidan procezon por volontuloj kadre de la volontulada aktivaĵo je la plej adekvata nivelo. Volontuladaj perantoj devus certigi ke volontuloj sentas sin propruloj de la projekto tra kundecido en la proceda implementado kaj la rajto, partopreni la demokratiajn procedojn rilate al la projekto. La volontulada peranto devus certigi aliron por la volontuloj por ke ili partoprenu la organizan vivon kaj decidajn procezojn. Plie, perantoj certigu ke volontuloj havas la aŭtonomecon por ellabori iliajn proprajn iniciativojn, se ili kontribuas al la organiza motivo.

Artikolo 42

Volontuladaj perantoj certigu ke ekzistas la necesa subteno por specifaj celgrupoj de eblaj volontuloj, ekzemple invaliduloj aŭ mensmalsanuloj, neplenaĝuloj aŭ plejaĝuloj.

Respondecoj por subteni la personan evolvadon de la volontulo

Artikolo 43

Volontuladaj perantoj disponigu la necesan edukadan subtenon por volontuloj dum la procedo. Plie, la volontuladaj perantoj certigu ke la volontulo havas eblecon plibonigi kompetencojn kaj kapablecojn kaj havas la ilojn por konscie reflekti la lernadajn procedojn.

Artikolo 44

Volontuladaj perantoj certigu ke agnoskilojn de la kompetencoj kaj kapablecoj akiritaj dum la volontulado disponeblas, kunlabore kun edukadaj kaj profesiaj strukturoj kaj institucioj.

Artikolo 45

Volontuladaj perantoj garantias la privatan sferon de la volontulo en persona kaj labora vivo, kaj ŝirmas ilian datojn.

SEKCIO IV

POSTA AKTIVAĴO

Eŭropa ĉarto pri rajtoj kaj respondecoj de volontuloj

Tiu Ĉarto utilas kiel alvoko al la Eŭropaj, naciaj kaj lokaj instancoj kaj ĉiuj aliaj koncernaj grupoj por projekti kaj ĝisdatigi politikaĵojn rilate al volontulado. Por respekti, protekti kaj plenigi la volontulajn rajtojn, unu leĝa kadro necesas por volontulado, kiu inkludas la rajtojn kaj respondecojn de la volontuloj, volontuladaj perantoj kaj difinas la rolojn de instancoj je ĉiuj niveloj.

Por implementi tiun Ĉarton kaj la leĝan kadron tra tuta Eŭropo, publikaj instancoj devas primeti adekvatajn leĝojn, politikaĵojn kaj programojn kunlabore kun ĉiuj koncernaj grupoj. La konstanta involviĝo kaj konsultado de ĉefaktoroj dum planado, implementado, stirado kaj evaluado de volontuladaj politikaĵoj devas esti garantiita, por krei senton de propreco kaj promocii aktiva civitaneco. La realigo de tiaj koncerngrupaj forumoj je la nacia kaj Eŭropa niveloj demandas adekvatan kaj daŭran fonduson.

